

	<h1>PENSEO</h1>	<i>N-ro 112</i> <i>Feb./2001</i>
	<b>Monata Beletra Revueto en Esperanto</b> <b>Honorita de Premio Grabowski, 1994</b>	
Fondita en 1990; Enretigita en 1997 <a href="http://www.crosswinds.net/~zfmao/penseo">www.crosswinds.net/~zfmao/penseo</a>		

## **\*\*Mikronovelo\*\***

### **Poŝtsendanto de Dezir-karto**

Li Zhixiang

Novjaro proksimiĝis. Li tamen ne sentis ĝojon. Ĝuste tiutempe, li ricevis dezir-karton, kion li ne atendis. Ekde la morto de sia edzino por unu monato, li neniel povis liberiĝi el la sufero. Li malvarme traktis la mondon ĉirkaŭ si kaj pluvivis pesimisme. Kiam oni persvadis lin revigliĝi, li ĵetis flegmajn vortojn al ili, "Mia koro jam mortis!" Post ŝia forpaso, li ĉiam sidis solece, drinkante senĉese. Ĉe la fino, li forte eltiris buŝon da vino kaj ĝemis per "mi ebrigiĝu" kaj plumbe falis sur la liton. Li ne sciis, kiu eĉ poŝtendis al li tiun dezir-karton en la mondo, kiun li malvarme traktis.

La desegno de la dezir-karto estis tre simpla. Sur la blanka fono pentriĝis verda folio, super kiu skribiĝis du vortoj "silenta deziro". Li ne povis trovi la nomon de la sendinto sur la karto, sed nur liniojn da vortoj skribitaj per plumo: "Ne provu diveni, kiu mi estas, nek necesas serĉi. Se nur vi scias, ke iu silente bondeziras por vi. La vivo ankoraŭ estas bela, ankoraŭ plenas je varmo kaj amo. Mi deziras, ke Novjaro restu kun vi."

Li legis tiujn liniojn foj-refoje kaj eksentis strion da varmo. Kiu finfine sendis ĉi tiun varmon? Li provis deĉifri tiujn vortojn. Sed vane, ĉar la bondeziranto vere kaŝis sian identecon pere de neta skribaĵo kaj lasis nenian personan stilon de skribado. Kiu finfine? Mi certe lin eltrovos.

La sekvan tagon, kiam li laboris en la oficejo, li zorgeme observis siajn kolegojn, kapsalutante kun rideto. Ekde la morto de sia edzino, li montris sian rideton la unuan fojon. La kolegoj reciprokis al li siajn ridetojn plenajn je varmeco kaj mildeco. Li ne kapablis distingi, ĉar ŝajnis al li, ke ĉiu aspektas kiel tiu bondeziranto. Krome, li telefonis al siaj kunlernintoj kaj amikoj, kaj tra

la aŭdilo li ricevis intimajn kaj sincerajn salutojn. Li ankoraŭ ne sukcesis distingi, kiu el ili estas la bondeziranto.

Inter tiuj belaj ridetoj kaj mildvoĉaj salutoj, li eksentis, ke la vivo ankoraŭ plenas je amo. En la fundo de lia koro io degelis kaj lia emocio glaciĝinta por longa tempo ekmovis. Lia koro ankoraŭ ne mortis.

"Ne provu diveni, kiu mi estas, nek necesas serĉi." Li ekmemoris tiujn vortojn. Li sciis, ke li neniel eltrovos la sendinton. Eltirinte la karton el la koverto, li karesis ĝin flegeme. Subite li ekvidis la poŝtstampon sur la koverto. La karto estis poŝte registrita. Kial ne iri al la poŝtoficejo por informiĝi pri la detaloj de la sendinto? Li do iris al la poŝtoficejo.

Komizo en la poŝtoficejo diris al li, "Nu, tiun sendinton mi memoras tre klare. Antaŭ du monatoj venis tre maldika virino. Ŝiaj lipoj preskaŭ perdis la vivecan koloron pro malsano. Ŝi diris, ke ŝi diros adiaŭ al la homa mondo post nelonge, ĉar li suferas de nekuracebla malsano. Ŝi petis min sendi tiun dezir-karton antaŭ la fino de la jaro... Mi scias, ke ŝi jam mortis, ĉar, kiam ŝi foriris, ŝi diris, ke ŝi poŝtsendos tiun karton propramane se ŝi povos tiri sian vivon ĝis la fino de la jaro."

Ĉe tio, li jam sciigis, kiu estis tiu sendinto. Li riverencis tre profunde, oni ne scias al kiu, ĉu al la komizo, kiu deĉifris la enigmon, aŭ al sia edzino, kiu sin trovis en eterna dormo.



**el la ĉina: Hongjia**

## Moderna Poemo

### Duafoja Adiaŭo al Ponteto Kang

Xu Zhimo

Foriras mi leĝere samkiel  
alvenis mi malpeze;  
mi ete svingas mian manon  
por diri adiaŭon al ujestaj nuboj.

La ora salikarbo ĉe la riverbordo  
aspektas kiel novedzino en vespera sunlumo;  
la bela reflektita figuro en spegulo onda  
dancadas, piruetas sur scenejo mensa mia.

La verdaj plantoj sur rivera ŝlimo  
skuiĝas svelte en la akvo;  
volonte mi fariĝus akva herbo  
en supraj ondoj de Kang-rivero!

Lageto tiu en la ombro de arbego ulma  
ne estas klara fonto, sed ĉielarko  
disrompigitaj inter algoj flosaj,  
precipitante sonĝojn ĉielark-similajn.

Kiel serĉi sonĝon? Remstangon longan premu,  
boato-remu ĝis herbaro la pli verda,  
kun boatpleno da stelbrilo,  
kaj kantu en stelbrila pompo.

Sed mi ne povas kanti laŭtevoĉe,  
ĉar senbrueco servas kiel fluto de disiĝo;  
someraj insektoj ankaŭ mutas por mi,  
ĉinokte Ponteto Kang dronas en silento granda.

Foriras mi leĝere samkiel  
alvenis mi malpeze;  
eksvingas mi manikojn miajn  
kaj foriras, kunportante eĉ ne pecon da nubo.

**elĉinigiis Fang**



## EL «LAŬZI»

### ĈAPITRO XV

(Ĉio, kion Laŭzi diras en tiu ĉi ĉapitro, estas laŭdoj al la homo, kiu atingis la Taŭon. Tia homo havas subtilan, misteran kaj grandaniman naturon; lia spirita regno estas multe super la komprenkapablo de la ordinaraĵoj; li estas singarda kaj skrupula, simpla kaj modesta. Kion ajn li faras, li ne strebas al absoluta perfekteco, kaj tiel li neniam sentas sin malkuraĝigita pro granda malsukceso. Li ŝajnas konservativa, sed en efektiveco li estas ĉiam favorata per sukcesoj.)

En la antikveco la Konanto de la Taŭo  
Havis saĝon subtilan, misteran, penetreman,  
Tro profundan por esti komprenata.  
Kaj ĝuste ĉar Li estis super nia kompreno,  
Mi povas priskribi Lin nur supraĵe.  
Singarda, kiel homo vintre travadanta riveron,  
Viglatenta, kiel homo sin gardanta kontraŭ danĝeroj  
ĉiuflanke,  
Gravmiena kaj rezerviĝema, kiel vizitanta gasto,  
Cedema, kiel degelanta glacio,  
Simpla, kiel nesulptita lignobloko,  
Modeste malferma, kiel valo vasta kaj kvietita,  
Ĉioampla, kiel akvomaso malklara.  
Kiu do povas kvietigi la malkvieton,  
Ke la malklaro iom post iom klariĝu?  
Kiu do povas, mem restante senmova longatempe,  
Movi la aliajn al iompostioma vigliĝo?  
Tiu, kiu tenas sin je tiu ĉi Taŭo, ne serĉas la  
dezirplenumon.  
Kaj ĝuste ĉar Li ne serĉas la dezirplenumon,  
Li povas konstante renovigi la malnovon.

### ĈAPITRO XVI

(Laŭzi rekomendas malplenigon de la menso kaj prenon de senpartia sintenado kontraŭ ŝanĝiĝado kaj disvolviĝado de ĉiuj estaĵoj. Laŭ li la ŝanĝiĝado, kiu estas nur moviĝado en cikloj, fine revenas al sia deirpunkto. Tio estas nomata reveno al la radiko. En la lasta analizo, tia moviĝado ne estas diferenca de senŝanĝeco, t.e. kvieteco. Ĉar la kvieteco estas la ĝenerala

principo reganta ĉiajn ŝanĝiĝojn, ĝi estas identa kun la eterneco. Por sekvi la principon de kvieteco oni ne devas agi facilanime kaj senpripense. Aplikante tiun ĉi principon al la ĉiutaga vivo kaj politikaj aktivecoj, li opinias, ke la “senagado” estas panaceo kontraŭ ĉia riskema ago, kiu povus vekti danĝeron.)

Malplenigu vian menson ĝis ekstreco;

Lasu vian koron resti en kvieteco.

La miriadoj da estaĵoj formiĝas kaj konkure kreskas,

Dume mi observas iliajn ciklajn ripetiĝojn.

Same kiel vegetaĵoj, ili kreskas diversmaniere

Kaj revenas ĉiu al sia radiko.

Tiu ĉi reveno al siaj radikoj estas nomata “retrovo de la kvieteco”,

“La retrovo de la kvieteco” estas nomata “reveno al sia destino”,

“La reveno al sia destino” estas nomata “la leĝo eterna”:

Kono de “la leĝo eterna” estas nomata “iluminiĝo”;

Ignoro de ĝi kondukas al blindaj agoj kaj katastrofo.

Tiu, kiu konas “la leĝon eternan”, ampleksas ĉion;

Ampleksante ĉion, li estas senpartia;

Estante senpartia, li agas kiel reĝo;

Agante kiel reĝo, li estas en akordo kun la Naturo;

Estante en akordo kun la Naturo, li estas en akordo kun la Taŭo;

Estante en akordo kun la Taŭo, li estas ĉiamdaŭra

Kaj libera de ĉia danĝero dum sia tuta vivo.

**Trad. wang Chongfang**



## Ĉina Fablo

**Nova Rakonto pri Vekuro  
inter Leporo kaj Testudo**

**Zhan Lu**

Kiel konate, en la unuafoja vekuro, Leporo, endormiĝinte dumvoje, postrestigis malantaŭ Testudo pro sia fiereco kaj kontentiĝo. Kiam la afero diskonigis, Testudo famiĝis, tiel ke li memkontentiĝis kaj malestimis Leporon.

Kaj Leporo, eklerninte la lecionon, gajnis venkon en la duafoja kaj triafoja vekuroj. Kvankam Testudo sentis malĝojon en la koro, li tamen vere ne estas pli kapabla ol Leporo en kuro. Por savi sian vizaĝon, diris al Leporo, “Frato, lastatempe mi pensadis foj-refoje, ke vere ne necesas juĝi, kiu estas gajnito or perdinto en vekuro inter ni. Ni devu preni amikecon en la unuan lokon, ĉu ne?”

“Jes, ni devu konsideri amikecon,” respondis Leporo.

“Por celebri nian novan amikecon,” Testudo proponis, “ni havu alian vekuron.”

Leporo konsentis. Ilia nova vekuro altiris grandan nombron da spektantoj.

Ĉe la komenco, Leporo rapide kuris kaj postlasis Testudon je longa distanco.

“Hola! Hola! Hola!” kriis Testudo. “Kial vi tuj forgesis la ĵusan promeson komplete, Frato?”

Turninte sian kapon, Leporo diris, “Mi ne komprenas kion vi volas!”

“Ve!” Testudo diris, “Ĉar vi ĉiam volas vin elstarigi kaj pavi, ĉu tio estas amikeco?”

Leporo demandis, “Kiel mi devas fari, laŭ via opinio?”

Testudo diris, “Ni zorgu pri unu la alian kaj kuru ŝultron ĉe ŝultra. Neniu el ni antaŭkuru la alian!”

el la ĉina: Shixiu



===Surreta Poemo===

## Sopiro

Echo

Tro multe vi ja pensas, kun peza ŝarĝo sur ŝultra

Sen kuraĝo granda, kial vi ne diris al mi?

Okuloj viaj fakte vin perfidis al mi.

Lun-maljunulo\* ĵetis ruĝ-fadenon avataren

per unu ekstremaĵo ĝia interligis vian koron

kaj per alia mian koron

mi ankaŭ scias, eĉ se vi ne diras

rigardo mar-simila

lumigis la fadenon ruĝan

kiu ekbrulis

per vasta flamo  
okulojn miajn brulpikante  
ekfalas larmoj  
malsekis mian plumon en la mano  
surpapere  
restiginte guton jen post guton  
ne larmoj ili estas  
sed la sopir' de la knabino.

\*Ĉina legendo diras, ke la lun-maljunulo, kiel Cupido, interligas per ruĝa fadeno la korojn de junulo kaj junulino. Se du gejunuloj estas ligitaj per lia ruĝa fadeno, ili estas destinitaj geedziĝi.

(el: [www.Wokankan.net/love](http://www.Wokankan.net/love))

**elĉinigiĝis Hu Yi**



**\*\*\*\* ORIGINALA PAĜO \*\*\*\***

**Semio(1964- )**

### ***Karbaj ministoj***

La grupo, kies estro estis afabla sinjoro A, havis 13 ministojn. Ili laboris en fundo de puto helpante unu la alian, kaj post laboro ili loĝis en sama granda korto ĉe minejo zorgante unu pri alia. De tempo al tempo ili kaj kunmanĝis kaj kundrinkis kiel samaj familianoj.

Iun tagon en laborado ministro C trafis dinamiton ŝajne neeksplozitan dum fosado per pioĉo, ke li mortigis sin. La korto fariĝis malĝoja, la grupo silentis.

La ministro C ne estas plena laboristo, ke la minejo donis al lia edzino, kiu ĵus venis en minejo, iom da mono. Fininte la funebro de sia edzo ŝi estis preta reiri sian vilaĝon. La estro decidis helpi ŝin kaj li alvokis siajn grupanojn plani sekretan aferon. Ili konsile restigis la edzinon de sia mortinta kolego kaj sukcesis.

Post tagoj nova butikoj por manmanĝaĵo trovis sin ĉe la vojo al laboro de ministoj. En la unua tago, kiam la butikoj ekfunkciis, 12 ministoj manĝis tie, poste preskaŭ en ĉiuj matenoj oni povis vidi tiujn 12 ministojn manĝi en la butikoj spite pluvadon kaj ventadon.

La edzinoj de la ministoj rimarkis tion kaj kovis miskompreniĝon. Iuj edzinoj ellitiĝis pli frue prepari

matenmanĝaĵon laŭ ilia ideo, kaj aliaj dubis, ke la edzoj ne manmanĝis, eble la manĝaĵo kuirita de ili ne estas bongusta ?

Kun granda dubo kaj miskompreno la edzinoj kunvenis por diskuti la problemon. Fine venis al ili bona ideo, ke ili kaŝe sekvis siajn edzojn. Apud la butikoj tra la matena nebulo ili klare vidis, ke la edzoj manĝas tie kaj iu bela virino gastigas ilin. La edzinoj komprenis ĉion. Kun kolerego kaj malespero ili foriris de la butikoj unu post alia.

En la sama vespero en la korto de ĉiu familio okazis forta buŝa batalo, kun spektantoj ĉirkaŭantaj. Malbenaj vortoj pli kaj pli multiĝis kaj la korto dronis en tuta konfuziĝo. La edzoj silentis, la infanoj ploregis, la edzinoj koleris kaj frenezis. Tiam la estro de la grupo senpacience eksaltis sur la difektitan ĉaron kaj kun tuta gorĝo kriis, "Ne kverelu! Ne riproĉu! Ni ne estas kulpaj..." La korto silentis. La estro klarigis ĉion, la edzinoj diris nenion.

En sekvanta tago oni denove vidis, ke la 12 personoj ankoraŭ manmanĝis en la butikoj. En la spektanta popolamaso troviĝis nur unu edzino. Ŝi diris al edzoj, ke ŝia edzo malsaniĝis restante en la hejmo.



\*\*\*\*\*

**Eldonas Redakcio de Penseo**

**Adreso: s-anino Harpina WU**

**Poŝtkesto 136, Jichang-xi,**

**Guangzhou, Ĉinio, CN-510403**

**E-poŝto: [harpina@21cn.com](mailto:harpina@21cn.com)**

**POŝT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!**

.....

**Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)**

**Adreso: Fremdlingva Fakultato,**

**Shantou**

**Universitato, Guangdong 515063,**

**Ĉinio**

**Tel: (0754) 2903012 (hejme)**

**E-poŝto: [wyd168@21cn.com](mailto:wyd168@21cn.com)**

**Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.**

\*\*\*\*\*